

# Ĉineske

(19)

**e-Librigita de Elerno**

**aprilo 2019**

# **Busuanzi (Aŭguristo)**

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de  
55,75 silaboj kun duona rimo.

## **Vejdo**

### **Infanoj en militfajro**

**Ja furiozas  
krima milito  
minace en la mondo  
jen sen invito.**

**Domoj disfalas  
kun tera glito.  
Nur ruinoj diable  
kuŝas kun spito.**

**Infanoj sen hejm'  
malsate kun kri'  
ĝemas kaj ploras triste  
en mort-agoni'.**

**Ĉion jam perdis  
eĉ sen famili',  
kompatindaj idoj, ve,  
vivas en Siri'.**

*2018-06-14*

## **Drakboata konkurso**

**Boatoj vicas  
ĉe startlinio  
por konkurso intensa  
kun energio.**

**Je gong-signal  
sonas ĝojkrio.  
La spektantoj aplaŭdas  
jen kun pasio.**

**Kiel navedoj  
boatoj glite  
veturas sur rivero.  
Vere ekscite**

**konkurso iras  
al ondoj spite.  
Ovacio eksplodas  
ja ĝiszenite!**

*2018.06.18*

En la grupo de Ĉina mondliteraturo okazis stafetado kun skemo de Ĉinesko Busuanzi:

### **Minosun:**

**Abundas formoj  
en nia budo**

**de ĉinesko. Por ili  
necesas studo.**

**Venas Busuanzi  
por nova ludo.  
Jen komenciĝis, brave,  
prova preludo!**

**Gajo:**

**kara Minosun,  
law Busuanzi ĉi  
kreu belajn ĉineskojn  
per inspiro ni!**

**kantu la vivon  
jen per emoci'!  
kantu Nian feliĉon,  
per ĝojplena kri'!**

**Vejdo:**

**Sur la montvojo  
iras kun peno  
ĉineskistoj fervoraj  
sen tima ĝeno.**

**Persisto estas  
jen bona beno  
por senĉesaj skribantoj**

en vers-tereno.

### **Zhuang Qixiong:**

**Paco aromas  
en frateca flor'.  
Kun amikeca flago,  
por bela memor'.**

**Ni ĉiuj ardas  
kun poeta kor'.  
Ĉinesko ĉiam brilos  
pro verda trezor'.**

### **Minosun**

**Friskas vespero  
post pluvo. Svarme  
chie en parko homoj  
kundancas charme**

**kaj arde kantas.  
Infanoj larme  
krias. Ankorau estas,  
ho, vere varme!**

### **Gajo:**

**birda koncerto  
eĉ je aŭroro  
vekas min el dormemo,**

**tuj ĉe malforo.**

**ekster la domo  
la birda khoru  
donas ĝojon en ritmo  
al mia koro!**

## **Minosun**

**Krepusko rughas.  
Al chiu direkt'  
fluas bicikloj, autoj,  
homoj en delekt'.**

**Trafiko pulsas  
en verva efekt'.  
Al celo min kondukas  
bona intelekto'.**

## **Qinyuanchun (Printempo en la Ĝardeno Qin)**

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 13 versoj de  
444,5444,447,354 / 6,35,5444,447,354 silaboj laŭ  
rimaranĝo xxa,xxxxa,xxa,xxa / a,xa,xxxxa,xxa,xxa (x =  
senrima)

### **Zhuang Qixiong**

#### **Maŭzoleo de Sun Jatsen**

**Bela pejzaĝ’  
vaste famas  
kun brila glor’.  
Grandas la hom’  
en kruta mont’.  
Just’ torentas  
jen sen dolor’.  
Fontoj lirlas,  
nuboj ŝvebas,  
rebrilas blanka marmor’.  
La floroj,  
herboj kaj pinoj,  
kun bonodor’!**

**Ĉu nur egal-valor’,  
libero,**

**frateco en kor’?  
Fratoj ne plendu,  
viv’ feliĉu,  
lando riĉu  
por gent-honor’.  
Nepre Ĉini’  
demokrata  
unuecos kun aŭror’!  
Gravuru  
admonon de Sun  
en la memor’!**



## Shiliuziling

### (Dekses-Silabo)

ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj,  
laŭ rimarangô a,a,xa (x=senrima)

### Eto

#### Bruema urbo

**Bru'**  
l' urba sonas en enu'  
ĉiame  
je nia malĝu'.

**Hup'**  
sonoras de aŭta grup'—  
jen vere  
orelpika kulp'.

**Muĝ'**  
buldoza en takta urĝ'  
navedas  
kvazaŭ en kur-fuĝ'.

**Kri'**  
reklama kun energi'  
laŭtegas

por onia sci'.

**Jen**  
urb' la tuta dronas en  
strangola  
voĉbrua ĉagren'.

### **Vivovojo**

**Viv'**  
estas ari' de kreiv'  
en aer'  
fluganta en driv'.

**Mi,**  
ludanto de l' melodi',  
ĝin plektas  
laŭ mia raci'.

**Flu'**  
ĝi estas kun ĝoja bru',  
libere  
forkure kun ĝu'.

**Vel'**  
mi estas sur la river'  
zorganta  
jen pri onda pel'.

**Fort'**  
vi estas en mia sort',  
mi de vi  
dependas ĝis mort'.

**Kor'**  
mia de l' korpa motor'  
vi estas  
sen ajna langvor'.

**Se**  
ĝi daŭras sufiĉe tre,  
progresas  
mi ja sen pane'.

## **Viro sub stratlampo**

**Pen'**  
en klopodado por gren'  
lin ĝenas  
vere por vivten'.

**Vag'**  
ĉien en lia imag'  
hezitas  
ankoraŭ en svag'.

**Sub**  
stratlampo, kun multa dub',

**pripensas  
li kvazaŭ en nub'.**

**Ne  
definitiva ide'  
aperas  
pro cerba pane'.**

**Kun  
cigared' enbuŝe nun  
cerbumas  
li jen sub la lun'.**

**En  
funnebul' li kun ĉagren'  
paŝadas  
tien kaj reen.**

**Al  
nenio en la real'  
lia pens'  
venas ĝis final'.**

**Ve,  
li cerbumas forte tre  
kun menso  
ja de malobe'.**

## **Amsento sub lun'**

**Lun'**  
**alte pendas super dun'**  
**mi kaj ŝi**  
**promenadas nun.**

**Ni**  
**kveras jen kun emoci',**  
**brakumas**  
**vere en pasi'.**

**Per**  
**dolĉaj vortoj en tener'**  
**parolas**  
**mi ja kun sincer'.**

**Al**  
**ŝi konfidas sen vual'**  
**mi ĉion**  
**kun tuta lojal'.**

**Kor'**  
**mia al ŝi kun favor'**  
**ja klaras**  
**kiel luna glor'.**

## **Li Weilun**

### **Vojaĝo al norda koreio**

**Ĉi-**  
**foje ni en Korei'—**  
**Bela land'.**  
**Jen najbaroj ni.**

**Pri**  
**amikeca histori'**  
**memoras**  
**ĉiam vi kaj mi.**

**Ni**  
**Instruis dum tagoj tri.**  
**Verda stel'**  
**brilas tie ĉi.**

*Noto:*

*De 4-a ĝis 7- a de junio la Unua Esperanto-Karabano vizitis Nordan Koreion. Vespere ni instruis Esperanton al kvar koreaj ĉiĉeronoj.*

**Lily**

### **Kruela amato**

**Jam**  
**estingiĝis l' arda flam'**  
**enkore**

**de l' unua am'.**

**Li**

**vanuis sen mia sci'  
senkaŭze  
sen adiaŭ, fi!**

**Sur**

**lit' ankoraŭ lia spur'  
videblas  
dum volupt-plezur'.**

**Kis'**

**lia sentiĝas jen ĝis  
nuntempe  
ankoraŭ sen mis'.**

**Ĝu'**

**brakuma ĉe rendevu'  
ja restas  
en memoro plu.**

**Kor'**

**mia batas kun fervor'  
senĉese  
pro lasta amor'.**

**Lud'**

**lasciva sub lia trud'  
malvestis  
min en plena nud'.**

**Kat-  
simile mi jen kun flat'  
obeis  
tre laŭ lia ŝat'.**

**En  
lit' orgiis ĝis maten'  
laŭplaĉe  
li kun la siren'.**

**Dum  
geiĝ' en mia brakum'  
li tordis  
sin kun laŭta zum'.**

**Post  
lud' li laciĝis ĝis ost'  
kaj dormis  
kvazaŭ ligna fost'.**

**Sed  
ĉion mi mole per ced'  
akceptis  
ĝis mia graved'.**



**Mal-  
fidelas kiel ŝakal'  
kruele  
li kun hont-vual'.**

**Ve,  
skandale ĝis apoge'  
li premas  
min ja al pere'.**

## **Mandio**

### **Rivero kaj monto**

#### **I.**

**Flu'  
rivera, kun kontinu',  
torentas  
laŭ mapa sinu'.**

**Flu'  
rivera ĝojas kun sku',  
kvazaŭe  
por movada ĝu'.**

**Flu'  
rivera, kun kontribu'  
al homar'**

**servas sen enu’.**

## **II.**

**Mont’  
jen alta ĝis horizont’  
aspektas  
kiel arkpont’.**

**Mont’  
konturas kiel mar-ond’,  
kun fluo  
falanta el font’.**

**Mont’  
nubskrapa super hom-mond’  
imponas  
per junverda front’.**

## **Ebrieco**

**Vin’  
pelas homon al inklin’  
al stato  
ebria mensŝpin’.**

**Ne  
io iras al l’ ide’,  
nur kun ĝu’  
nebuleca tre.**

**En**  
**menso ne klara kompren’**  
**naskiĝas**  
**krom ĝoja festen’.**

**El**  
**cerbo kreiĝas fabel’.**  
**Nenio**  
**ne estas de bel’.**

**Li**  
**nun bravegas kun defi’.**  
**Danĝeroj**  
**mankas en ebri’.**

**Sur**  
**bordo li ĵeti kun rul’**  
**kuraĝas**  
**en akvo kun hul’.**

**De**  
**klifo li kontraŭ pere’**  
**desaltas**  
**suben al ŝose’.**

**Bak’**  
**fajra per brula atak’**

ne povas  
vundi lin je l' brak'.

Li  
ĝojas ĝui sen konsci'  
ĉi ĉion  
ja en fantazi'.

Ve,  
ebriul' en mens-pane'  
vekiĝu  
al klara ide'!

## Mao Zedong

### Tri poemoj

Mont'!  
Fluge rajdas mi per spron'.  
Renvide —  
je lazur' frapont'!

Mont'  
ĉe mont' kvazaŭ ond' ĉe ond'  
k mil ekvoj  
kurus en lukt-front'.

Mont'  
tra l' ĉielo ĉe renkont'!

## **Ĝi falus sen vi la kolon’.**

*Rimarkoj.*

*La tri poemoj estis verkitaj de Mao Zedong en 1935 dum la Ruĝa Armeo estis en longa marŝo.*

*Je lazur’ frapont’ = fraponto je lazuro, t.e. (kiam mi atingas la montsupron) mi estas preskaŭ fraponta la ĉielon (en stato de fraponto je la ĉielo).*

*Mont’ tra l’ĉielo ĉe renkont’ = monto trapikas la ĉielon kiam monto kaj ĉielo estas ĉe renkonto.*

## **elĉinigis Licius**

### **Mao Zifu**

**iso**

**is’  
perdis sin en fulma dis’.  
restas nur  
graniteca mis’.**

### **Minosun**

**1.**

**Lun’  
en akvo, pinoj en brum’,  
strobiloj  
teren falas nun.**

2.

**Roj'**  
**murmuras, senhomas voj';**  
**la lunon**  
**ne prilumas ĝoj'.**

3.

**Ŝi**  
**petolas... Flosas ĉe li**  
**rideto**  
**kaj eĉ fantazi'.**

4.

**Lun'**  
**promenas sola en brum',**  
**vaga kat',**  
**sed, paŝas kun zum'.**

5.

**Hom'**  
**faras pagilon, sed mon'**  
**ŝvitigas**  
**lin eĉ sen ordon'.**

6.

**Ta!**  
**Donu l' sorton al mora',**  
**se mankas**  
**libroj kaj moka'!**

## Sero

### Forgeso

Vi  
povas forgesi sen sci'  
printempon  
jen pro apati',

sed  
ne l' rakonton sur la sled'  
inter ni  
kun ama kunmet'.

Se  
vi eĉ ĝin forgesos, ne  
forgesu  
pri nia ide'.

Ĉar  
mi ĉiame sen erar'  
tenas vin  
en kora vual'.

Nu,  
reciprokas nur ni du  
la amon  
firme ja sen sku'.

## **Vejdo**

### **Printempa vent'**

**Vent'**  
**blovas el l' orient'**  
**susure**  
**per dolĉa turment'.**

**Jen**  
**ludas sur herba teren'**  
**ĝi sible**  
**tra mia ĝarden'.**

**Jen**  
**ĝi ĝoje flirtas sen ĝen'**  
**leĝere**  
**kun burĝona ĉen'.**

**Jen**  
**ĝi kisas ŝosojn kun ben'**  
**ameme**  
**en suna festen'.**

**Jen**  
**dancas en freŝa maten'**  
**ĝi sur roj'**  
**post glacia sven'.**



**Vent'**  
vekas ja per varma sent'  
naturon  
al viviga splend'.

### **Monta diluvo**

**El**  
mont' kvazaŭ el la ĉiel'  
alsturmas  
mortiga kruel'.

**Pluv'**  
ŝajne disfluas el kuv'  
torente  
en monta diluv'.

**Mont'**  
disfalas de horizont'  
terure  
jen ĝis nia front'.

**Ter'**  
dronas en flua liber'  
ŝlimeca,  
glita en danĝer'

**Vic'**  
da terdomoj laŭ kapric'

**faladas  
plaŭde en vortic'.**

**Ar'  
da brutoj en la batal'  
baraktas  
por denova star'.**

**Muĝ'  
inunda pelas al fuĝ'  
la homojn  
en terura fuŝ'.**

**Kri'  
homa laŭtas en anksi'  
ulule  
ŝajne de mani'.**

**Jen  
la savbrigada alven'  
vidiĝas  
al kriza teren'.**

**Jes,  
kontraŭ inuda agres'  
luktadas  
ili ja sen ĉes'.**

# Yanke

## Funebre pri mia frato

**Ve!**

**Frato mia juna tre  
jen paŝis  
ĝis sia pere'.**

**Plu**

**ne jam aŭdiĝas voĉbru'  
kaj ridoj  
viaj sen enu'.**

**Jam**

**malaperis kiel flam'  
la mien'  
de mildo kaj am'.**

**Ni**

**du vivis en famili'  
intime  
kaj en harmoni'.**

**En**

**antaŭkabana ĝarden'  
ni kune  
laboris kun pen'.**

**Al**  
**montopinto ni de val'**  
**grimpadis**  
**per voja spiral'.**

**Per**  
**boat' ni du laŭ river'**  
**vojaĝis**  
**foren en vesper'.**

**Por**  
**trovi keston de trezor'**  
**ni ŝvite**  
**fosis ĝis aŭror'.**

**For**  
**tiuj bildoj el memor'**  
**vanuis**  
**ja kiel vapor'.**

**Nur**  
**rakontas venta susur'**  
**pri viaj**  
**malĝoj' kaj plezur'.**

**Por**

**Por**

**unu rev' mi kun fervor'  
iradas  
ĝis la cel' en for'.**

**Mi,  
spite ĉion kun defi',  
esperas  
bonon de premi'.**

**Sed  
antaŭ malica obsed'  
anhelas  
mi, tamen sen ced'.**

**Sent'  
tima en ajna moment'  
ne kaptu  
min per pen-turment'.**

**Ĝoj'  
min akompanas sur voj'  
sinua  
al monta orgojl'.**

### **Paseo**

**Jam  
forpasis l' amara am'  
ve, kiel**

**estingita flam'.**

**Ne  
mi devus ja al pase'  
sindone  
alkroĉiĝi tre.**

**Mi  
ofte drinkas ĝis ebri'  
ĉiame  
en memorglaci'.**

**Vin'  
malrapide ronĝas min  
ĝisoste  
eble ĝis vivfin'.**

**Per  
ĉagreno en malesper'  
mi velkas  
en ama mizer'.**

**Ve,  
min ĝeni mi devus ne  
ĉagrene  
per tia ide'.**

**For**

**el la ombro de malglor'  
min savos  
mi jen en ĉi hor'.**

**Al  
pase' mi diru sen pal'  
adiaŭ  
per vina pokal'.**

### **Floro en vazo**

**En  
vazo flor' kun malĝoj-plen'  
lamentas  
pri sia ĉagren'.**

**Kun  
radikoj en vaz-brakum'  
mi kreskas  
en farita hum'.**

**Al  
mi ja mankas sunvual',  
kun vangoj  
en velkinta pal'.**

**En  
malhela koridor' jen  
mi spiras**

**kun malĝojmien'.**

**Pro  
akvomanko, varmo tro  
konsumas  
forton. Kion do?**

**El  
koro mi sub la ĉiel'  
ja volas  
vivi en lumhel'.**

**Sed  
mastro insistas sen ced'  
min flegas  
en la ĉambra bed'.**

**Ve!  
Iam mi senvive tre  
treniĝas  
ĝis fina pere'.**

**Osmanta aromo**

**Fru-  
matene sen ajna bru'  
eliras  
mi por promen-ĝu'.**



**Mal-**  
**larĝa la pado en pal'**  
**kondukas**  
**min jen al florar'.**

**Bon-**  
**odor' min al la gazon'**  
**altiras**  
**kvazaŭ per ordon'.**

**Or-**  
**flavaj steletoj de flor'**  
**atakas**  
**min per bonodor'.**

**Fin-**  
**fine mi ja en proksim'**  
**rekonas**  
**osmanto ĝin.**

**Dis-**  
**aromas ĝi foren ĝis**  
**mia dom'**  
**ŝvebante kun glis'.**

**Ne-**  
**mirinde mi frue tre**  
**vekiĝas**

**kun ŝafa obe'.**

**Pas-  
antoj ja ankaŭ por ĉas'  
de arom'  
haltas en amas'.**

**Pri-  
laŭdoj sonadas al ĝi,  
ridanta,  
jen en sunradi'.**

**Ver-  
vere en sia tener'  
ĝi logas  
homojn kun prefer'.**

**Mir-  
indaj floroj sen flatdir'  
akiras  
amon de admir'.**

## **Xiangjianhuan**

### **(Ĝojo de Intervidiĝo)**

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun tri kaj kvar versoj respektive de 6,3,9 / 3,3; 3,9 silaboj laŭ rimarangô  
aaa / bb,aa

**Li Yu**

#### **Floroj velkas**

**Flora velk', printempe!  
Hastante!  
Ve! pluv' taga, vent' nokta fride.  
Larm' por mi  
En ebri':  
Kiam re-?  
Viv' plendadas, kvaz' roj' fluante!**

*alia versio:*

**Floroj velkas, printempon spite,  
Haste, rapide,  
sub matena pluv' kaj vespera vent',  
senhelpite.  
Ŝminke larmas vi  
ĉe mi en ebri'.  
Kiam revide?  
Kvazaŭ roj' fluadas, plendas viv'**

## **neĉesigite!**

*Rimarko: Li Yu (937-978), fina reĝo de la Suda Tang-dinastio(937-975). Lia regno estis detruita de Song-dinastio, kaj li fariĝis kaptito. Fine, li estis venenigita. Dum la malliberiĝo, li foje drinkis vinon kun kortega servistino. En ĉi tiu poemo, 'larmo' kaj 'ŝminke larmas' aludas la servistinon.*

Li Yu (937-978)

## **Nostalgio**

**Mute surturen un'.**

**L' arka lun'.**

**Sola l'omok' en kort' sub aŭtun'.**

**Nostalgj',**

**en seri':**

**la kor' nun**

**sentas, malorde, guston iun.**

Noto: La vorto 'omoko' (de la korea lingvo, el ĉina origino) signifas altan kaj valoran arbon de *Firmiana platanifolia* (ekz. sterkulio) aŭ foje ankaŭ de *Paulownia fortunei* (paŭlivnio), sur kiuj ofte sidas fenikso (la plej bela kaj nobla birdo).

Elĉinigi**s Licius**

## **Yijiangnan (Sopir-al-Sudo)**

ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj  
laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).

### **Eto**

#### **Mi estas rojo**

**Glugl-glugle  
fluas leĝere  
mi senĉese antaŭen  
spite ŝton-baron vere,  
kuras libere.**

**Mi plenas  
ĉiam de memfid'  
sen tim' al tera distord'.  
Sturmas per forta senbrid'  
mi kun ĝoja rid'.**

**Mi restas  
juste firmvola  
kontraŭ cunam' kaj ŝtormo  
kontraŭ granit' malmola,  
jes, mi ja sola.**

**Mi fluas  
al monta valo**

**kovrita per verdaĵoj  
inter leviĝ' kaj falo  
en akv-kristalo.**

**Mi ŝatas  
verdon de l' natur',  
belaj floroj disfloras  
tie kaj alie sur  
ĝi kun vid-plezur'.**

**Mi fluas  
al la kamparo  
por akvumi plantaĵojn,  
nutri per akv-nektaro  
jaron post jaro.**

**Mi fluas  
al la urbeto  
por beligi l' medion,  
trinkiĝi homojn en preto  
sen flu-impeto.**

**Mi fluas  
al stepo vasta  
por ĉirkaŭpreni herbojn  
junajn kun kresko hasta  
sur grundo ĉasta.**

**La tero  
vasta senlime  
estas ja hejmo mia.  
Sentas mi min proksime  
al ĝi intime.**

**Ne povas  
mi disde la ter'  
min apartigas vere,  
mi ĝin amas kun sincer'  
per ajna ofer'.**

### **Mia kunvojaĝanto**

**Vi kaj mi  
sur vivovojo  
renkontiĝis hazarde  
por la unua fojo  
ĉe streta roĵo.**

**Tiam vi  
kun korpo eta  
ekis homan vojaĝon  
en manier' vegeta  
per paŝ' malpreta.**

**Komence  
vi plendis al mi  
pri mia ir' rapida**

**kelkfoje jen kun plorkri'  
jen sen energi'.**

**Tiam vi  
ege bezonis  
mian helpeman manon  
kaj mi ofte ĝin donis  
ĉiam vin spronis.**

**Kun tempo  
fariĝis vere  
stabilaj viaj paŝoj.  
Vi iradis leĝere  
kaj eĉ fiere.**

**Vi multe  
plenkreskis alte  
kaj aspektis tre sane,  
vi marŝadis ekzalte  
plue senhalte.**

**Post jaroj  
mi elĉerpita  
min sentis senkonscie  
en ago tre hezita,  
ne plu ekscita.**

**Nuntempe**



**mi jam senila  
ne povas iri glate  
nek antaŭen trankvile  
marŝi facile.**

**Devancis  
min jen vi jame  
per longaj firmaj paŝoj.  
Mi ĝojas por vi same,  
laŭdas vin ame.**

**Rigardas  
jen mi de fore  
la dorsfiguron de vi,  
dum mi lamas langvore  
kaj malfervore.**

**Deziras  
mi al vi ido  
antaŭenmarŝi pluen  
por pli granda merito  
jen kun memfido.**

### **Somermeza pluvo**

**Antaŭ pluv’  
griza nub-arme’  
peze premas minace  
super aŭt-plena ŝose’**

**kvazaŭ ĝis pere'.**

**Jen tondras.**

**Ekas pluvtorent'  
bati la teron forte  
jen en furioza vent'  
laŭ sia kontent'.**

**Inundas  
akvo inside  
en stratojn kaj rizkampojn  
kvazaŭ kuranta rapide  
ĉeval' senbride.**

**Sub premo  
de venta blovo  
falas arboj sur teron  
eĉ sen rezista povo  
pro forta ŝovo.**

**Surstrate  
homoj evite  
sin ŝirmas sub tegmentoj  
aŭ marŝas senhezite,  
al pluvo spite.**

**Abrupte  
aperas la sun'**

tuj post ĉes' de pluvego.  
Ĉio en varma brakum'  
nestas ree nun.

### **Aŭtuno alvenas**

**Cikadoj**  
mutaj sensone  
adiaŭis por serĉi  
varmegon laŭbezone,  
kanti sent-drone.

**Kvakado**  
de ranoj ĉesas  
en frida akv' en kampo.  
Ilin ventvip' agresas,  
sed ne karesas.

**Okaze**  
ĉirpadas griloj,  
svingante la flugilojn,  
energie per triloj  
sub lunaj briloj.

**Kampmusoj**  
dormas en kviet'  
en nesto el pajleroj  
post maizgrajna diet'  
kaŝita en pret'.

**Knabpaŝtist’  
preterpasas jen  
laŭ kampvojo kaj bovoj  
ronĝas herbojn per buŝplen’  
ĉe la suna sven’.**

**La vento  
blove sendas for  
sovaĝanserojn norden,  
krie kun gaka sonor’  
de impona ĥor’.**

**Mi diris  
jam al la somer’  
adiaŭ kun ŝtormpluvo,  
tajfun’ kaj brula veter’  
super seka ter’.**

**Renkontas  
mi ja denove  
aŭtunon orkoloran,  
generan fruktipove,  
ravan multmove.**

### **Ekneĝado**

**Griz-nuboj  
kuniĝas are,**

kaj frost' ĝisoste pikas.  
Brum' ĉirkaŭas vuale,  
kovras malklare.

Unue  
pluvo alvenas  
kun hajlograjnoj etaj,  
vent' ankaŭ partoprenas,  
alblovoj ĝenas.

La pluvo  
frapas dolore  
sur homojn senombrelajn,  
kaj la frosto ĉihore  
pikas ĝiskore.

Paliĝas  
laŭgrade ĉiel'.  
Videblas neĝaj flokoj  
dance flirti en pelmel'  
sub frosta ventpel'.

Ekneĝas.  
El ĉiela blu'  
neĝeroj falas blanke  
kvazaŭ je kribrilo-sku',  
amase sen bru'.

**Blankiĝas  
tegmentoj, la ter',  
branĉoj, herbejoj, kampoj.  
Birdoj nestas sen aper'  
pro ebla danĝer'.**

**Sur ŝose'  
aŭtoj jen raras  
pro malfacila vetur',  
kelkaj simple nur staras,  
ĉar neĝo baras.**

**Baldaŭe  
nur blanka kolor'  
jam reĝas sur la tero.  
Neĝas forte kun fervor'  
per ŝuta labor'.**

**Ja daŭras  
je duona tag'  
neĝado intermita.  
Ĉio sub ĝia atak'  
dronas en blank-svag'.**

### **Dum soleca tempo**

**Mi volas  
en la kabano  
min fermi volonte,**

**tie 'stas ne kompano  
nur simpla pano.**

**Mi havas  
kelkajn librojn nur,  
kaj mi ja ade legas  
ilin kun buŝa murmur'  
kaj granda plezur'.**

**Legante,  
pensas libere  
mi per bela imago  
kaj skribas surpapere  
versojn abele.**

**Soleco  
min vere mordas,  
sed mia vol' obstinas.  
Mia kor' ja ne mortas  
kaj l' cerbo fortas.**

**Gustumas  
la suferon mi  
de soleco ĉiama  
en ĉi kanabo kun pi'  
sen ajna anksi'.**

**Mi scias,**

**nur pacienco  
servas kiel instigo  
al kreiva intenco—  
bona komenco.**

**Tre laca  
mi eĉ sentas min  
fojrefoje senĉese,  
mi persistas kun obstin',  
spite al destin'.**

**Okaze  
kun trankvila kor'  
rigardas tra fenestro  
mi nubon kun blankolor'  
aŭ arbon en sol'.**

**Longlonge  
kutimas mi jam  
al tia enkabana  
soleco sen kora flam'  
plie eĉ sen am'.**

**Volontas  
mi sidi vere  
en soleca kabano  
kaj vivas korleĝere,  
vivas prefere.**



## **Kiam ni oldos**

**Kiam ni  
oldas en futur',  
ni uzos irbastonon  
kaj ni vivos kun kor-pur',  
fartos kun plezur'.**

**Tiam ni  
jam iros ne plu  
longan vojon al foro.  
Ni povos sidi sen bru',  
mediti kun ĝu'.**

**Tiam ni  
ne plu kun koler'  
traktos ĉiujn aferojn,  
nepre agu kun toler'  
kaj ne kun fier'.**

**Tiam ni  
eble sentos nin  
soleca kun enuo,  
ni pluvivu kun obstin',  
ne plendu sen fin'.**

**Tiam ni  
kaptos en memor'**

**tion kaj ĉi tion de  
pasinto, sed en la kor'  
grumblu en dolor'.**

**Tiam ni  
probable vere  
ne povos zorgi pri ni,  
nek movi nin libere,  
sed ni sincere**

**petos de  
aliaj doni  
helpon vere necesan,  
ne ekstraĵon de oni  
por ni bezoni.**

**Fine ni  
kuŝos en lito  
kun serioza malsan',  
ni foriru kun spito,  
kun brav-spirito.**

### **Pikniko**

**Printempe  
belas vetero.  
Zefir' karesas varme,  
sunlumas super tero  
helas l' etero.**

**Jam pretas  
ĉio por piknik':  
kuiriloj, legomoj  
jen por kuira praktik'  
sub ombra salik'.**

**Karbfajro  
flamiĝas arde.  
Siblas ole' en pato,  
legomkuboj petarde  
frititas salte.**

**Leviĝas  
el rizo vapor'  
vaporumita varme  
en bolanta kaserol'  
kun dolĉa odor'.**

**La supo  
bobelas bole—  
porkaĵoj kaj fungpecoj  
kiriĝas karambole,  
pretas ĉi-hore.**

**Sur herba  
tapiŝo pladoj  
bongustaj dismetitas.**

**Alvenas ja gefratoj  
kun vortaj flatoj.**

**Ja ĉiuj  
manĝas kun ĝuo,  
ridante, babilante  
sub la serena bluo  
en ĝoja bruo.**

## **Gajo**

### **Verdaj steloj brilas**

**En Ĉini'  
la verdaj steloj  
super nordokcidento  
glimbrilas kiel perloj!  
— monda espero!**

**Verduloj  
sur *Ora Ponto*<sup>1</sup>  
post Trezoro kaj Ardo<sup>2</sup>  
marŝadas *Tra la Mondo*<sup>3</sup>  
spit' al tajdondo!**

1. *Ora Ponto: Esperanta Centro Ora Ponto en Jingchuan, Gansu, Ĉinio, starigita de Trezoro, Ardo kaj aliaj.*
2. *ĉinaj eminentaj esperantistoj*
3. *Tra la mondo: esperanta gazeto kuneldonita de E-centro Ora Ponto kaj E-rondo de Germanio en januaro, 2017*

## **Printempa bildo**

**Paseroj  
trilĉirpas kun ĝoj',  
ekverdas salikbranĉoj,  
fiŝoj navetas en roj',  
aŭdiĝas hundboj'!**

## **Somero**

**somero,  
varma sezono.  
la suno vershas flamon,  
des pli sur tropikzono,  
en brula drono!**

**nun al ni  
venas somero.  
en tiu kreska sezono  
regas floroj, abeloj,  
bel' kaj prospero!**

## **Feliĉo**

**Feliĉo  
restas en tio,  
ke vi kaj la karuloj  
sanas en bon-medio  
kaj melodio!**

**Feliĉo**  
kuŝas en tio,  
ke l' infanoj libere  
ludas en harmonio,  
kaj kun ĝojkrio!

**Feliĉo**  
venas el tio,  
ke l' old edzino ne plu  
babilemas sen scio,  
sed kun racio.

**Feliĉo**  
kreskas el tio,  
ke legas Esperante  
fablojn vi en hobia  
kaj kun kor-pio!

**Feliĉo**  
nestas en tio,  
ke vi, via kunulin'  
kunvivas en pasio,  
sed sen anksio.

**Feliĉo**  
fontas el tio,  
ke vi ĉiam kontentas,  
kaj plendas pri nenio,

sen larmostrio!

## Jadranka Miric (Serbujo)

### Aŭtuno

Aŭtuna  
posttagmeza hor'  
Malheliĝas ĉielo.  
Pro fulmo timiĝas kor'.  
Birdoj flugis for.

.

Aŭtuna  
ŝtormeto kurtas.  
Trompas nin aĉa veter'  
Homoj sin varme vestas  
kaj fi-lamentas..

Videblas  
pluvofloketoj.  
Ĉielo kvietiĝis  
Jen, kuras du hundetoj  
laŭ stratvoĵeto.

Krepusko  
iĝas viola.  
Post suna aperado  
eĉ tero iĝas mola.  
Nur vi, ve, sola.

**Oriĝas  
ŝprucofontano .  
Sunsubiro nestis sur  
la pinto de kaŝtano.  
Sur ŝtipo pano.**

## **Loka biciklanta konkurado**

**Balonoj  
diverskoloraj  
flugas tien alien.  
Gaje krioj infanaj  
eĥas.Tre ĝojaj.**

**Sur stratoj  
nur biciklantoj.  
Ja, ekis nova sezon',  
hastas ĉi konkurantoj.  
Aŭdiĝas kantoj.**

**Bonveno  
estis skribita  
sur ligno ŝildo bela,  
cikloforme ĉizita,  
ruĝe farbita.**

**Viciĝas  
homoj brue. Ve.**



**Volontuloj apenaŭ  
tenas ilin sufiĉe  
estu surstrate.**

**Finfine  
brava venkinto  
pasas celon. Kriaĉoj  
atingas ĝis pinto.  
Venas gajninto.**

### **Juniaj pluvoj**

**Subitaj  
pluvo gutetoj  
kovris mian vizaĝon.  
Sunradioj kaj nuboj  
en tango-dancoj**

**Brilantaj  
pluvgutoj pace  
reflektiĝas simile  
sur marĉetoj aŭ lace  
lagosurface.**

**Freŝiĝas  
aer'. Ni spiras  
pli facile. Dume ni jen,  
kurantaj vin atingos.  
Luno videblas.**

**Sandalojn  
formetas oni.  
Malsekaj herboj tuŝas  
nudpiedojn. Kuras ni  
senlace, al vi.**

**Senzorgaj  
horoj kaj bildoj  
el infanec'. Feliĉo  
nestas en koroj. Briloj  
en la okuloj.**

### **Sentitole**

**Soife  
vortojn sorbas  
viajn. Neforgeseblaj.  
La hararon ŝi tondas  
se al vi plaĉas.**

**Tre longe  
kunvivadis ni.  
Zorgeme flegas unu  
la alian. Kredas vi  
en homaro ĉi.**

**Amikec'  
samkiel aer'**

**bezonata al homoj  
akvo al rozoj kaj ter'.  
Amo vera ver'.**

**Pacigi  
homojn eblas, ĉu?  
Diversmaniere. Jes.  
Glavojn ne krucigu plu.  
Militojn haltu.**

**Parolu,  
interkonsentu,  
protektu la popolon,  
ĉiam kaj ĉie. Sentu  
amon. Ne pentu!**

## **Sentitole**

**Griziĝas  
ĉiel'. Fulmetoj  
el malproksimo tondre  
eĥas. Kurtaj pluvetoj  
antaŭ ŝtormetoj.**

**Kverado  
de turtoj milde  
niajn korojn influas.  
Fulmoj kvazaŭ surbilde  
ekas rapide.**

**Depost pluv’  
videblas klara,  
multkolora ĉielark’.  
Koncerto birdara ĉe  
Petro kaj Mara.**

**Subbrake  
ŝi tenas forte  
lin. Ridanta mieno  
ampromeso senvorte.  
Certe, ĝismorte.**

**Odoras  
freŝe naturo.  
Ne plu soifas tero.  
Brilas verda valmuro  
de Rtanj turo.**

*\*Rtanj -montego troviĝanta en la orienta parto de  
Serbio de kie videblas duono de Serbio*

## **Al kara Saliko**

**Gajigas  
mian koron vi.  
Letera interŝanĝo.  
Malproksime loĝas vi.  
Mia kara, ci.**

**Mi skribis  
pli detale pri**

**ĉiutaga vivo, pri  
mialanda histori'.  
Vi pri famili'.**

**Leteroj  
flugas al via  
unika, fabela urb',  
de suda lando, mia,  
kara Serbia.**

**Malbela  
temp'. Mizera. Fi  
lando bombado. Sekvis  
suferoj. Animoj pli  
ne plu elteni.**

**Via ec',  
Homa egalec',  
profunde en mi restis.  
Solidara amikec'...  
Vivu humanec'!**

## **Post la pluvaj tagoj**

**Finfine  
suno honte tra  
nuboj aperis. Freŝa  
aero preskaŭ vintra.  
Tero jam putra.**

**Gajiĝis**  
birdet' flugante  
de unu al alia  
branĉet' , milde pepante.  
Ĥoruse. Lante.

**Aŭdiĝis**  
jam, grila ĉirpad'.  
Dum senlacaj formikoj  
scias nur por laborad'  
sen ĝoja parad'.

**Kun bela**  
veter' sekiĝos  
moliĝa tero ke tuj  
herbejo ekfloriĝos.  
Ĉiel' bluiĝos.

**Varmiĝas**  
vangoj de suna  
tuŝo. Brue infanoj  
pilkon ludas ĝis luna  
aper'. Helluma.

## **Vivo-energioj**

**Junulo**

**venas kun floroj.  
Florbukedo el rozoj.  
Ruĝaj por amesprimoj.  
Am' sen ĵaluzoj ,**

**ne eblas.**

**Amtenero en bluec'.  
Fiero kaj fidelec'  
ĉu se adorec'.**

**Sen amo**

**vivo ne eblas  
sur Tero nek en aer'.  
Viola ja, allogas.  
Amon influas.**

**Koloroj**

**de la vivo , ve  
ne decidas ĉu blanko —  
nigra estu viv' sed de  
fi-faroj , ĉu ne !**

**Por vivo**

**kaj amo kaj sun'  
ne sufiĉas. Aero**

**por spiri nepras. Eĉ Lun'  
nokte. Tage Sun'.**

## **Sentitole**

**Noktiĝas.  
Vibras stratolamp'  
ĵetante ombrojn longajn.  
Laŭ poeta vortokamp'  
Hele lumas lamp'.**

**Lampiroj,  
la strataj iloj  
viciĝas. Brilas forte.  
Ĉirkaŭ ili skaraboj.  
Flitras en cirkloj.**

**Fenestroj  
kvazaŭ steletoj  
Dum nokto malheliĝas.  
Malpleniĝas stratetoj  
sen kandeletoj.**

**Paca nokt'.  
Nek bojas hundoj.  
Regas mira silento.  
Nur vekiĝas amantoj.  
pro koro flamoj.**



**Paliĝas**  
**Luno vaganta.**  
**Aŭdiĝas matena kok’**  
**forte kokerikanta.**  
**Vin salutanta .**

### **Sekeco**

**Sufokas**  
**veter’. Malbona**  
**por la homoj kadukaj.**  
**Aŭdiĝas gril’ laŭtsona..**  
**Ĝuo sindona.**

**Ondiĝas**  
**herbej’. Matena**  
**roso bonvena estus.**  
**Foras freŝa nokt’ jena.**  
**Peze eltena!**

**Fontanoj**  
**ŝpruce allogas.**  
**Birdetoj alflugantaj**  
**soife sin apogas.**  
**Ĉarmloge trinkas.**

**Sekiĝis**  
**tero. Ŝtormeton**  
**atendas homoj urĝe.**

**Aŭ akvo-tubo-reton.  
Ŝpruci tereton.**

**Nokta pluv’  
savanta afer’.  
Ĉiuj diras feliĉe  
“Bonvenas pluvo sur ter’.  
Beata ĉi ver’.”**

### **Ŝanĝo de klimato**

**Somero  
pasis rapide.  
Ĉi-jare floris stranga  
klimato floro.Vide  
nek plaĉa fide.**

**Maro de  
mizeroj.Ĝemoj  
pro peza misfortuno.  
Nun,je ĉiuj mondflankoj.  
Tro da obstakloj.**

**Depost pluv’  
inundoj restas.  
Kaloj sur vojoj ,domoj.  
Bestokadavroj korkas,  
koron traboras.**

**Lametas  
vilaĝanoj tre  
kaptitaj kiel musoj  
fuĝas. Hunda viv' ofte  
iĝas fatale.**

**Rikolto  
nenia. Pezaj  
zorgoj prenas la bruston.  
Homoj dronos en ŝuldoj  
ĝiskole. Povraj.**

### **Aŭtunas**

**Septembro  
alvenis sune.  
Komenciĝis migradoj.  
Bridoj flugantaj kune  
trans maren Lune.**

**Lernantoj  
deziras puŝi  
ĉielarkon pro feliĉ'.  
Ne plu sur plaĝo kuŝi  
sed scion tuŝi.**

**Laŭ strato  
kuras ĉi vento  
flavfoliojn. Morta danc'.**

**Pli kaj pli fortas vento.  
Malgaja sento!**

**Origas  
aŭtuna suno,  
kaj maizo sur kampoj.  
Rikoltadoj ĝis Luno  
aper'. El tuno**

**da dolĉaj  
fruktoj gajnas vi  
tunojn da sukoj. Benu  
la naturon, mildan, ni.  
Dank' al kara Di'.**

## **Estonteco nia mallaŭda**

**Matena  
suno kaŝita  
inter nubetoj. Veras.  
Kvazaŭ vitro ŝprucita.  
Nepurigita.**

**Kia tag'  
tia humoro.  
Ve, ne aŭskultas vi min.  
Kia rigardo, koro  
mia. Fi, oro!**

**Alogas  
vin, plena, ja  
monujo, luksa domo.  
Ĉio faciluzebla,  
je spiro kurta.**

**Neĝeroj  
falas malofte,  
por pli blankigi mondon  
kaj ĝin purigi softe.  
Nepre volonte!**

**Homaro  
sin purigos de  
malbono per amo aŭ  
ni malaperos tute  
laŭnature. Ve.**

## **Kiam nebulo leviĝas**

**Blankiĝis  
altaĵo. Flokoj  
falas malrapide. Jen,  
ŝvebas aere miloj .  
Ĉiuj steletoj**

**seŝpintaj!  
De neĝa kristal'**

**lameno sesangula.  
Dance tra aerbatal'  
pretiĝis por bal'.**

**Matena  
tre densa nebul'  
kovris blankajn branĉaron.  
Videblas nenia ul'  
nur tiu neĝul'.**

**Ĉirkaŭ dek  
horoj matene  
leviĝis nebul'. Sune  
elpelita. Senĝene.  
Vere senpene!**

**Sur klara  
blua ĉielo  
videblas blankaj spuroj  
de aviadil' pelo  
pro tagohelo.**

## **Unu ordinara vintra tago**

**Malvarma  
januaro ĉi.  
Ŝanĝiĝas glacia pluv'  
kaj neĝo. Vintro mire**

**desegnas fenestron. Mi  
skribas grandan ci.**

**Ci por Vi.  
Amo sur glaci'!  
Moliĝas desegnaĵo.  
Perdiĝas litero Ci  
Malgajiĝas mi .**

**Birdetoj  
flugantaj alten  
Kriaĉas kirlantaj. Jen  
du korvoj flugas reen.  
poste realten!**

**Enspiras  
mi aeron ĉi.  
Ho, frostas gorgo mia.  
Sur termomezuril' tri  
sub nulo. Eĉ pli!**

**Surstrate  
aŭdiĝas krioj.  
Ho, trafikakcidento!  
Pro glitado? Ne, hundoj  
kuras por aŭtoj!**

## Ankoraŭ vintras

Vekiĝas  
floraj heraldoj  
de frua primavero.  
Ĵus ekfloris galantoj  
neĝaj princinoj.

Paseroj  
saltetas ĝoje.  
Jen, kolomboj flugantaj.  
Juna paro survoje  
dancas fojfoje.

Ĉe strata  
angulo hom'  
la kaŝtenojn vendanta.  
Haladza aer'. Al Tom'  
jen, mankas ozon'!

Subita  
neĝa degelo  
kaŭzas inundoj. Same  
en la kavo de melo  
kaj en dom' kelo.



**Vesperoj  
en ĉi Februar’  
estas malvarme freŝaj.  
Nokte mankas la stelar’  
pro nigra nubar’.**

### **Je vivfino**

**Malgaje  
eĥas kanto ĉi.  
Funebra ceremoni’  
longas. Larmoj pli kaj pli.  
En okuloj Vi.**

**Ĉu Dio  
ploranta kun ni?  
Maloftaj ombreloj jen,  
punktiĝas nigre. Ĉu Di’  
jam estas kun Vi.**

**Aperas  
ĉe tombejo Sun’.  
Lantas piediro ĉi.  
Fortas krio iun.  
Aŭdiĝas ĝis Lun’.**

**Ploris ni  
kantante kune  
vian kanton “Ne ploru ,**

**kara, venos mi Lune”  
por festi .Ĉu ne ?**

**Resonis  
brue lametad’.  
La ĉerko trovis lokon.  
La eternan. Terĵetad’  
fina salutad’!**

## **LA VERO VENKOS**

**Martiraj  
batalantoj. Nin  
patrujo bezonas tre.  
Leviĝu Serbio sin  
protektu ĝis fin’.**

**Senhalte  
jam angoras kor`.  
Animo suferanta.  
Pro la popola valor`  
jam grandas dolor`.**

**Histori’  
miljara via.  
Raska, Duklja, Zeta  
Bizanco. Poste nia  
Srbio pia.**

**Turka  
longa okupad'.  
kaj fina ribelado.  
Postvivis ni militad'  
dum hitlera Ad'.**

**Komuna  
land' dividita,  
sange dispartigita.  
La popolo bombita  
kaj ekstermita.**

## **Lumospuro**

**Jam longe  
ne observis mi  
foran ,bluan ĉielon.  
Nek steleton tiun ĉi  
falanta de vi.**

**Faladis  
rapide steloj.  
Ĉu tio homo mortas?  
Silente kun briletoj  
estingiĝas? Ve.**

**Falantaj  
anĝeloj, eble.  
Perditaj en disputoj.**

**vivi pli tolereble,  
pli klerigable.**

**Por longa  
vivo morala  
valoras batali. Ho  
mi pia..Fi skandala  
la vivo pala.**

**Vivi laŭ  
siaj principoj,  
harmonie inter si  
kun amikoj, gaje. Hoj  
sen karmovipoj!**

**Luiza CAROL (Israelo)**

## **SOPIRO EN JANUARIO**

**Forflugas  
la bird' el kaĝo;  
sopiras al suda sun',  
al pli bongusta manĝo...  
revas pri ŝanĝo...**

## **SOPIRO EN FEBRUARO**

**Tremtimas  
la bird' en vento**

en frosta brua urbo,  
malsatas sur tegmento  
sed sen lamento.

## SOPIRO EN APRILO

Kunulon  
la birdo trovas,  
preparas neston ame.  
La brizo milde blovas.  
La vivo novas.

## Sero

### Tempo

Kiel vent'  
fulmas susure  
ĝi — oni diras — preter  
la vid' ĉevalveture  
foren senspure.

Tiktake  
ĝi sonas klare —  
oni diras — laŭritme,  
jen kiel ondoj mare  
batas plaŭd-fale.

Ĝi marŝas,  
marŝas senlace —

**oni diras — pasante  
preter homoj donace  
sensone pace.**

**Alternas  
la sezonoj kvar  
kaj pentras la hararon  
de gehomoj sen erar'  
grize en egal'.**

### **En nebulo**

**Matene  
je nebula fal'  
mi iras, volvata per  
blanka gazeca vual'  
sub lumo de pal'.**

**Ĉirkaŭ mi  
ĉio vapore  
kunfandiĝas en nebul',  
deproksime aŭ fore  
blanka kolore.**

**Aŭdiĝas  
nur voĉoj homaj  
interrompaj kaj svagaj,  
staras konturoj domaj,  
umoj sennomaj.**

**Jen ŝajne  
forlasitas mi  
en la blanka , vasta mond',  
jen mi reĝas sen defi'  
pri l' teritori'.**

**Mi scias,  
trompas la natur',  
ĝi kovras la terenon  
per la grizblanka velur'  
je mia plezur'.**

**Se nebul'  
dispeliĝos jam,  
ĉio klariĝos tuje,  
revenos kiel ornam'  
la kolora gam'.**

## **Vejdo**

### **Forto de kampuloj**

*el la rakontoj pri Afanti*

**La reĝo  
iĝis scivola  
kaj alvokis Afanti**

**por demando petola  
kaj ŝajne fola.**

**“Vi ĉien  
migris tra la mond’.  
Ĉu vi eltrovis iun  
pli forta ol mi per sond’  
en la pleba rond’?”**

**Afanti  
diris mokride  
“Tre multajn, via moŝto!”  
Reĝ’ kapneis malfide  
ĉuis rapide:**

**“Ho, kiuj  
estas personoj  
pli fortaj ol mi fakte?”  
reĝo ĉuis en tono  
duba sur trono.**

**“Ili ja—  
kampuloj vere!”  
Afanti jen respondis.  
“Fi!” la reĝo kolere  
diris, “Sufere**

**ja ili**



**vivas kaj nure  
povas plugi. Do kiel  
pli fortus ili sure  
de mi nature!”**

**Afanti  
refutis moke,  
“Vi eraras, reĝa moŝt’!  
Ili ja fortas roke  
kaj viglas boke.**

**Se ili  
ne nutradus vin,  
kian forton vi havus  
por domini kun sangvin’  
stari sen kapklin’?”**

## **Lunbrilo kaj akvobrilo**

*el la rakontoj pri Afanti*  
**Anoncist’  
sur la reĝa tur’  
en vintra tago kriis:  
“Aŭskultu vi ĉiuj! Nur  
tiu, kiu sur**

**urbomur’  
tranokti nude  
povos, ricevos de reĝ’**

**la filinon inklude  
landparton tute.”**

**Afanti  
pensis ĉe tio:  
indas blagi al la reĝ’,  
kiu al la nacio  
ruzas sen pio.**

**Li iris  
do al la palac’  
kaj diris al la reĝo:  
“Via moŝto, kun aŭdac’,  
falu via grac’**

**jen sur min.  
Mi volas vere  
tranokti sur l’ urbmuro  
por promeson espere  
gajni fiere.”**

**La reĝo  
jen ordonis tuj  
depreni lian veston  
loki lin sur urbomur’  
por nokti en nud’.**

**Li certis,**

**ke tiu kreten’  
mortos pro nokta frosto,  
ĉar mordos ĉe nokta ven’  
lin venta siren’.**

**Afanti  
petis ekkrie:  
“Ordonu meti ŝtonon  
egan en preto tie  
por uzo plie.**

**La reĝo  
miris pri l’ peto:  
“Kial tiel, kreteno?  
Simpla estas ŝtonmeto  
kaj tuj en preto.”**

**Respondis  
Afanti ruze:  
“Estas mia sekreto.  
Mi agos tute furze,  
se vi rifuze.”**

**La reĝo  
vole nevole  
preparis ĉion por li  
kaj traktis lin malmole,  
eĉ ĝis strangole.**

**En nokto  
regis malvarmo,  
tamen Afanti staris  
aplombe jen en kalmo  
kontraŭ frost-svarmo.**

**Ekrulis  
la ŝtonegon li  
tien kaj reen ade  
penante kun energi'  
kaj kun laŭta kri'**

**“Varmege!  
Varmege! Ho fu!”  
Afanti laŭte kriis.  
Aŭdis ĝin la reĝ' kun ĝu'  
tra la mura tru'.**

**Je aŭror'  
Afanti fine  
surmetis sian veston,  
iris al reĝ' proksime,  
petis obstine:**

**“Via moŝt',  
mi tranoktis jam  
senveste sur la muro**

**kaj vi devas laŭ l' proklam'  
doni ĉiel ajn**

**filinon  
vian kaj parton  
de land' al mi laŭ promes'.  
Nu, ne uzu ruzarton  
nek eskap-salton.”**

**La reĝo  
sin tenis muta  
por ruze elturniĝi  
per rimedo altruda  
kaj vere kruda.**

**Li fakte  
ne 'stis sincera.  
Nur distriĝi li volis,  
ne prenis tion vera,  
promes-ofera.**

**Post tempet'  
li ĉuis false  
“Ĉu vi vidis la lunon?”  
“Kial ne? Kiel farse  
kaj embarase!”**

**La reĝo**

ŝajne en koler’  
kriis, “Vi varmigis vin  
per lunbril’ por vivesper’  
kontraŭ frostsufer’.

Vi trompul’  
kun malbona kor’  
staras kontraŭ l’ kondiĉoj,  
nigrigas vin per malglor’!  
Afanti, vi for!”

Afanti,  
tre, tre kolere  
forlasis la palacon.  
Li ekloĝis prefere  
foren libere.

Post tempdaŭr’  
la reĝo ĉasis  
tutan tagon en kampar’,  
kabanon preterpasis  
sed ne forlasis,

ĉar kohort’  
lia en sufer’  
soifa serĉis akvon  
sub sunbakanta ĉiel’  
de varma somer’.

**Troviĝis  
puto ĉe kaban',  
kie Afanti loĝis.  
Jen la reĝo kaj kompan'  
rajdis kun elan'**

**al kaban'  
kaj kriis sone,  
"Kie estas la mastro?  
Gastoj venas impone!  
Kondu tu bone!"**

**Afanti  
eliris ride,  
"Kiel mi povas helpi?"  
"Donu akvon rapide  
kaj senhezite!"**

**"Momenton!"  
Afanti diris,  
"Akvon mi alportos tuj!"  
Al la puto li iris  
kaj jen deŝiris**

**la ŝnuron  
de la sitelo  
kaj kaŝis ĝin sub sablon,**

**sidiĝis en kvieto  
kvazaŭ asketo.**

**La reĝo  
post longa atend'  
ordonis subulon lin  
serĉi pro senĉesa plend'  
pri lia ofend'.**

**La subul'  
baldaŭ revenis  
kaj raportis, "Afanti  
humiligi vin penis  
kaj eĉ malbenis.**

**Li diris,  
'Li, stulta azen',  
mem venu al la puto!'  
Kia absurda kreten',  
tiu arleken'!"**

**Al la put'  
li devigite  
iris kun la subuloj  
paŝante malrapide  
kaj korp-rigide.**

**Ĉe l' puto**



li kriis boje,  
“Kreteno, kie akvo?”  
Afanti diris ĝoje,  
“Jen vidu foje

en puton!”  
La reĝ’ rigardis  
en la puton kaj muĝis  
al li kolero-ardis  
kaj ade saltis.

“Kreteno,  
kiel mi povas  
trinki sen sitelŝnuro?  
Kion mavan vi kovas?  
Kion vi provas?”

Afanti  
diris en trankvil’  
“Jen vin sensoifigu  
ne per akvo, sed akv-bril’  
laŭ via dezir’!”

La reĝo  
kriaĉis gale,  
“Ĉu sensoifigi min  
povas akv-bril’ reale  
aŭ trompi male?”

**Afanti**  
diris sincere,  
“Kiel akv-brilo ne vin  
sensoifigas vere,  
ankaŭ modere

la lunbril’  
ne povas iom  
varmigi ja en nokto  
frosta la korpon de hom’,  
ho, ho, neniom!”

### **Bonege!**

*el rakontoj pri Afanti*

**Afanti**  
portis ĝojplene  
melonojn al la reĝo,  
kiujn li plantis pene,  
jen surazene.

**La reĝo**  
kun laŭdo bona  
akceptis ilin ĉiujn  
sed sen pagado mona,  
jes, nenioma!

**La reĝo**

**trifoje nure  
ride diris, “Bonege!”  
Afanti jen murmure  
foriris kure.**

**Pro malsat’  
li eniris en  
manĝbutikon por manĝi.  
Bulkojn englutis sen ĝen’  
li kun ridmien’.**

**Li tamen  
ne pagis tute  
kaj nur diris trifoje  
“Bonege!” senbalbute,  
foriris mute.**

**La mastro  
flame kolera  
akuzis lin antaŭ l’ reĝ’  
pro la kondut’ fiera  
kaj malsincera.**

**Al la reĝ’  
li diris rore,  
“Afanti ja ne pagis  
por manĝaĵo ignore  
jen ĵusa-hore.”**

**La reĝo**  
**riproĉis tondre,**  
**“Afanti, ĉu vi rajtas**  
**ne pagi vagabonde**  
**kaj ja senhonte?”**

**Afanti**  
**diris mokride,**  
**“Via moŝt’, mi jam pagis**  
**per laŭdoj tuj rapide**  
**kaj senhezite.**

**Trifojaj**  
**“Bonege!” diris**  
**mi kiel vi jam faris,**  
**kiam vi ja trankvilis**  
**kaj vi foriris**

**preninte**  
**melonojn miajn.”**  
**La reĝ’ ne povis diri,**  
**frotante manojn siajn**  
**vortojn aliajn.**

## **Sindefendo kontraŭ ŝtelistoj**

*el la rakontoj pri Afanti*

**Afanti**

**preter la palac’  
paŝis kaj vidis onin  
konstrui pene sen lac’  
laŭ la reĝa plac’**

**muregon  
ĝian alten pli.  
“Kial ĝin plialtigi?”  
al vokto demandis li  
kun scivola kri’.**

**La vokto  
iom oldaĝa  
respondis en moka ton’,  
“Kian stultaĵon, saĝa  
vi vir’ kuraĝa,**

**diraĉas!  
Estas nia cel’  
sekurigi l’ palacon  
kontraŭ la ŝtelistoj de l’  
fia malfidel’,**

**kiuj ja  
volus trudi sin  
por rabi valoraĵojn.  
Tiel oni ja sen tim’  
vivas laŭ rutin’.”**

**“Vi pravas,”  
Afanti sen ĝen’  
diris, “sed kion fari,  
se ili troviĝas en  
palaca teren’?”**

### **Admono de Alaho**

*el la rakontoj pri Afanti*  
**Afanti,  
ofte de malsat’  
suferis pro malriĉec’.  
foje sur la bazar-strat’  
kriadis en laŭt’:**

**“Sendito  
de Alaho mi  
estas! Mi de Alaho!”  
La reĝo jen sciis pri  
tio kun envi’.**

**Venigis  
li lin al palac’  
kaj demandis: “Vi diras,  
ke vi devenas de Alah’,  
diru al mi, aĥ’**

**do, kion**

**Alah' admonis?"**  
**"Lia admon' riĉigos,"**  
**Afanti tion donis,**  
**ŝajne friponis.**

**"Rakontos**  
**mi al vi plue,**  
**kiam mi ja satiĝos.**  
**Jen alportu unue**  
**manĝon senbrue."**

**La reĝo**  
**pensis pri la bon'**  
**alportota de Alah',**  
**aranĝis jen per ordon'**  
**manĝon en salon'.**

**Post manĝad'**  
**Afanti diris:**  
**"Alaho min admonis:**  
**'la reĝ' de vi rab-ŝiris**  
**monon kaj tiris**

**vin al marĉ'**  
**de povra stat'.**  
**Vi rajtas sate manĝi**  
**ĉe l' reĝo laŭ via ŝat'**  
**kiel lia frat'!"**

## **Mandareno en boato**

*el la rakontoj pri Afanti*

**Mandaren’  
foje per boat’  
veturis kun Afanti,  
ektimis sub onda bat’  
sur flua malglat’.**

**Tremante,  
li tiris forte  
la baskon de Afanti,  
petante: “Timas morte  
mi, malbonsorte.**

**Mia kor’  
elsaltos pro tim’.  
Bona Afĉjo, bonvolu  
ja eldanĝerigi min  
de morta ruin’.**

**Afanti  
respondis lante:  
“Via moŝto, rimedo  
ekzistas sendemande,  
sed ĉu marĉande**

**akceptos**



**ĝin vi aŭ nee?”**  
**“Certe vian konsilon**  
**mi ja sekvos obee,**  
**fidele tree”**

**Insistis**  
**la mandareno:**  
**“Mi volonte konsentas**  
**ion ajn kun kompreno,**  
**tuje sen ĝeno!”**

**“Bonege,”**  
**Afĉjo admiris,**  
**“do en akvo vi spertu**  
**unue,” dum li diris**  
**akven lin tiris.**

**Post pluraj**  
**subakviĝoj jen**  
**Afĉjo kaptis je l’ haroj,**  
**enboatigis per tren’**  
**lin kun plor-mien’.**

**En boat’**  
**li timis ne plu.**  
**Afanti ĉuis ruze:**  
**“Kiel vi vin sentas, fu?**  
**Tre komforta, ĉu?”**

**“Ha, jes, jes!”  
la mandareno  
respondis rapidege,  
treme en korpa pleno  
pro malvarm-ĝeno.**

**Meditis  
Afanti mute:  
“Tiu, kiu neniam  
subakviĝis, jen tute  
ne, absolute**

**ne ajne  
sekurecon de  
boato. Kiel vi  
kapablas kompreni tre  
malsaton, ho ve,**

**de tiuj  
povruloj klare,  
se vi ĉiame manĝas  
frandaĵojn joviale,  
tute malŝpare!”**

**Ankaŭ vi estas lupoj**

*el la rakontoj pri Afanti*  
**Nobelo**

ŝafon savis el  
la buŝo de lupo kaj  
ĝi sekvis lin kun fidel'  
al hejm' de l' nobel'.

Li hejmen  
iris fiera.  
Li preparis buĉi ĝin  
per tranĉilo ŝtalfera  
per man' kruela.

La ŝafo  
pro lia perfort'  
blekadis ja senĉese  
en lia malgranda kort'  
evite de mort'.

La krio  
Afanti-n vere  
surprizis, kiu loĝis  
najbare, netolere  
iris kolere

al la kort'.  
Klare la nobel'  
diris: "Mi ĝin el lupo  
savis pro ĝia mizer'  
sub brutala pel'."

**Afanti**  
jen serioze  
ĉuis: “Kial ne dankas  
ĝi, sed blekas riproĉe  
kaj tre nervoze?”

**Riproĉas**  
ĝi mizere sub  
via mortiga pozo.  
Vi agas kun peza kulp’,  
vi ja estas lup’!”

### **Frenezulo**

*el la rakontoj pri Afanti*

**Afanti**  
post longa resto  
en urbo pro afero  
reiris al hejm-nesto  
por ripoz-festo.

**Survoje**  
en arbaron li  
misiris kaj jen vidis  
nobelon ĉasanta ĉi  
kun granda pasi’.

**Retenis**

**lin tiu krie  
ĉuis: “De kie venas  
vi?” dirante defie,  
senemocie.**

**Afanti  
respondis klare:  
“De tiu urb’ nefora,”  
montrante senerare  
al l’ urb’ trans-vale,**

**kiu ja  
estas la hejmlok’  
de l’ nobelo kun luksa  
kastel’ sur fortika rok’  
kun granda allog’.**

**La nobel’  
jen demandis plu:  
“Kia la urbo estas?”  
“Bela kun bona situ’  
kaj kun viva ĝu’!”**

**“Nun diru:  
kiel la riĉaj  
homoj kondutas tie.”  
“Ĉiuj mon-superstiĉaj  
kaj perfortiĝaj.”**

**“Kiel pri  
la mandareno?”  
“Li estas tre tirana  
kiel stulta azeno  
kun kruelpeno.”**

**Ĉe tio  
ĉuis la nobel’:  
“Ĉu vi vere konas min?”  
Afanti respondis: “Ne,  
ne, ne, neniel.”**

**“Mi estas  
tiu mandaren’.”  
Do, Afanti demandis:  
“Respektinda moŝto, jen,  
ĉu konas vi mem**

**min vere?”  
“Ne, mi asertas!”  
“Tiea frenezulo  
mi tute esti certas  
kaj mi avertas,**

**ke kvankam  
mia frenezo  
ne ĉiam min atakas,**

**mi agas laŭ herezo  
ja sen komplezo.”**

**Afanti  
aldonis plue:  
“Mi ja benas vin sane  
kaj malsane mi brue  
diraĉas ĝue!**

**Hodiaŭ  
en malsan-stato  
mi tamen diris al vi  
la veraĵon laŭ ŝato  
sed ne la flaton!”**

### **Aŭtuna pluvo**

**En aŭtun’  
pluvo kun tiktak’  
falas en friska nebul’  
jen sub venteta atak’  
de sursura krak’.**

**Silkeca  
pluv’ en svaga fum’  
verŝas gutojn sur teron  
varman en somer-brakum’  
de akvo-konsum’.**

**La tero  
malseka plenas  
je kotaj akvaj flakoj.  
Dum pluv-draŝo alvenas,  
la floroj svenas.**

**Insektoj  
sin kaŝas en tru'  
por eviti pluvbaton  
kaj atendi sen ĉirp-bru'  
tempon de sun-ĝu'.**

**La roĵo  
torentas pro ŝvel'  
kun falintajn foliojn,  
frapas bordojn per ribel'  
de akv-flua pel'.**

**Arbare  
birdoj en silent'  
sin per malsekaj plumoj  
volvas en pluvbata vent'  
kun panika sent'.**

**Endome  
mi kun plezuro  
legas romanon novan,  
surda al pluv-murmuro**



kaj vent-ululo.

## La surtutoj de bienuloj

*el la rakontoj pri Afanti*

**Por manĝi  
ŝafon senpage  
de Afanti komplotis  
bienuloj tromp-age  
jen iutage.**

**Alvenis  
ili al lia  
kaban' kaj ĥore kriis,  
“Venos, kara Afanti,  
mondfino fia!**

**Domaĝe!  
Perdiĝos vane  
la ŝaf' bredita de vi  
penege propramane  
kaj akompane.**

**Hodiaŭ  
venas bonkore  
ni helpi ĝin formanĝi!  
Ni klopodu fervore  
por ĝi labore!”**

**Dirinte,  
ili ĵetis sin  
sur la ŝafon feroce  
kaj kruise buĉis ĝin  
al peca ruin'.**

**Afanti  
diris nun, "Bone!  
Ĉar la mondfin' alvenos,  
mi bredas nebezono  
ĝin furaĝ-done.**

**Surtutojn  
viajn bonvole  
demetu antaŭ ĉio  
por refreŝigi fole  
ne plu petole.**

**Lasu min  
prepari en ord'  
kaj kuiri l' ŝafaĵon  
por via palata mord'  
kun ĝu' en komfort'."**

**Post tio  
li por kuiru  
fari preparojn tuje  
laŭ ilia deziro**

**ja sen suspiro.**

**Kaj fakte  
li jen kaŝis tuj  
la ŝafaĵon, bruligis  
la surtutojn sur fajruj'  
kun flama ĝojbru'.**

**Post kiam  
ili de ludad'  
revenis por la ŝafaĵ',  
ili trovis kun malsat'  
nenion sur plad',**

**sed nure  
cindron en fajrbrul'  
de iliaj surtutoj.  
La bienuloj kun hurl'  
en duba nebul'**

**ekkriis  
ĥore denove,  
“Afanti, kion faris  
vi kontraŭ ni ruzkove  
kaj stulte bove?”**

**Bruligis  
vi eĉ aŭdace**

**niajn luksajn surtutojn!  
Kiel kruda minace!  
Kiel malplaĉe!”**

**Afanti  
diris sen anksi’,  
“Karaj, morgaŭ tuj venos  
mondfin’, ĉu vere ili  
utilos al vi?”**

### **Ne risku vian vivon**

*el la rakontoj pri Afanti*  
**Survoje  
juĝist’ sur ĉeval’  
renkontis Afanti kaj  
tiu riverencis al  
li en jovial’.**

**Demandis  
Afanti sone,  
“Kien iras via Moŝt’?”  
“Edenen,” li ronrone  
diris impone.**

**“Ĉu volas  
iri tien vi,  
por ke ni ĝuu kune?”  
“Ho, ne,” diris Afanti,**

**“eĉ se volus iri mi!**

**Pli bone**

**ja ankaŭ vi ne!”**

**“Kial?” ĉuis la juĝist’.**

**“Vi ja forgesemas tre!**

**Ĉu vi diris, ke**

**Alaho**

**ne grandanime**

**traktas malbonfarantojn**

**kiuj venas pilgrime**

**de malproksime.**

**Kion vi**

**faros, tiame**

**se vi renkontos Lin? Ne**

**vian vivon fifame**

**risku sename?”**

## **Balai la korton**

*el la rakontoj pri Afanti*

**Afanti**

**jen kiel junul’**

**penlaboris tagnokte**

**por vilaĝa bienul’**

**kiel stulta mul’.**

**Laŭ regul’  
la mastro al li  
devas pagi salajron  
je jarfino sen vari’  
kaj ajna menci’.**

**Nun  
venis la tago  
lasta de la jaro jam,  
la mastro per fi-ago  
volis je l’ pago**

**senigi  
lin ruzoplene.  
Al Afanti ordonis  
li balai zorgeme  
la korton pene.**

**Li diris:  
“Balau pure  
ĝin sen akvoverŝo, sed  
ĝi malsekas plezure  
kaj brile pure.”**

**Afanti  
obeis jen**

**kaj ekbalais korton.  
Li pensis, kiel, kun pen',  
ja purigi sen**

**akvoverŝ'  
korton espere,  
sed kun malseka grundo.  
Do, li elprenis vere  
zorg-maniere**

**la tutan  
stokon da ole'  
de l' mastro kaj aspergis  
ĝin sur la teron ĉie  
glate, glite tre.**

**Post tio  
li ĉe koridor'  
sidiĝis kaj atendis,  
ke la mastron pro l' labor'  
laŭdos per honor'.**

**Revenis  
la mastro ĝoje  
sed kiam li rigardis  
la teron fojrafoje,  
li kriis boje:**

**“Ho, Alah”!  
Redonu al mi  
oleon, ho, oleon!  
Mi ne salajron al vi  
donos, al vi fi!”**

**Afanti  
diris kviete:  
“Ĉion mi faris bone  
laŭ ordono diskrete  
kaj belrimede.**

**Bonvole  
pagu salajron  
al mi laŭ interkonsent’.  
Ne ludu kolerfajron  
nek ja kanajlon.”**

**La mastro  
nenion tute  
diris, al Afanti  
pagis salajron mute  
kaj sendispute.**

### **Tri maksimumoj**

*el la rakontoj pri Afanti*  
**Por vivpan’  
Afanti kun ŝnur’**



**iris al bazaro por  
dunganton kun kora pur'  
kaj favoro nur.**

**Li staris  
por taglaboro  
kaj rigardis ĉirkaŭen.  
Alvenis grandsinjoro  
kun ruza koro.**

**Deklaris  
li malĝentile  
jen al laborseĉantoj:  
“Aŭskultu min trankvile  
kaj senbabile.**

**Aĉetis  
mi je alta prez'  
keston da glasoj luksaj,  
kiu volas kun komplez'  
por buŝa enspez'**

**dorsporti  
al mia domo.  
Mi donos tri maksimumojn  
je mia nobla nomo  
al li, sen mono.**

**Neniu  
reagis jese,  
sed Afanti konsentis  
dorsporti ĝin promese  
kaj sinforgese.**

**Afanti  
jen kun granda pen'  
dorsporti l' keston fine  
ĝis la riĉula ĝarden'  
de bela teren'.**

**Li petis  
de la riĉulo  
tri plej altajn maksimumojn  
jen per sia postulo  
kun avid-brulo.**

**“Aŭskultu  
laŭ via ŝato,”  
La riĉulo do diris:  
“La diron, ke malsato,  
ho, mia frato,**

**ol sato,  
ne kredu ĝua.”  
“Bone!” diris Afanti,  
“Kio estas la dua?**

**Jen mi senbrua!”**

**“La diron  
ne kredu tute,  
ke piediri bonas  
pli ol rajdi ĝoj-lude,  
ne absolute!”**

**“Pravege!  
Jen akceptas mi  
tiujn brilajn konsilojn!  
Kaj la tria opini’  
de l’ saĝa radi’?”**

**Daŭrigis  
la riĉulo jen:  
“Tion neniel kredu,  
ke malsaĝas ne azen’  
pli ol vi en splen’.”**

**Aŭdinte  
tion kolere,  
Afanti lasis ŝnuron.  
Kraak! La kesto libere  
falas sufere**

**surteren.  
Afanti moke**

**fingromontrante l' keston,  
ja maksimis provoke  
kaj solid-roke:**

**“La diron  
plene kredu ne,  
ke tiuj glasoj tute  
ne disrompiĝis ja tre  
en pecojn, ho ve!”**

### **Ne ŝercu per via vivo**

*el la rakontoj pri Afanti*

**Juĝisto  
rajde sur ĉeval’  
jen renkontis Afanti  
revenantan de bazar’  
kun porviva var’.**

**Salutis  
li riverence  
kaj diris: “Kien iras  
via moŝto intence?  
Ne konfidence?”**

**La juĝist’  
diris fiere:  
“Ha, al la paradizon!  
Ĉu vi iros espere**

**kun mi prefere?”**

**Afanti**

**diris decide:**

**“Ho, ne, eĉ se mi volus.**

**Vi mem iru rapide**

**ne nur rajd-side.”**

**“Pro kio?”**

**Afanti al li**

**diris: “Ja via moŝto**

**forgesis, ke iam vi**

**konsilis al mi**

**ke homoj**

**malbonojn faras**

**ĉiame kaj Alaho**

**kontraŭ ili jen staras,**

**punojn ne ŝparas.**

**Ja pri vi**

**mi maltrankvile**

**zorgas, ĉar, se renkontos**

**vin Alaho alire,**

**kaj laŭaspire,**

**do kio**

**okazos vere?**

**Nu, ne ŝercu per vivo  
via nekonsidere,  
ha, tre danĝere!”**

## **Honto**

*el la rakontoj pri Afanti*

**Ŝtelisto  
venis kaŝite  
en hejmon de Afanti  
kiu sin kaŝis glite  
en keston sprite.**

**En ĉambro  
ŝtelisto pene  
serĉis ĉie, ne trovis  
valoraĵojn sinĝene,  
paŝis ĉagrene.**

**Li fine  
malfermis ŝtele  
la keston, surprizite  
vidis Afanti-n ele  
de l' kest' anhele.**

**Demandis  
ŝtelisto mire:  
“Kion vi faras ene?”  
Afanti jen suspire**

**diris spirtire:**

**“Pardonon!  
Ĉar ne povas vi  
trovi riĉaĵojn dome,  
pro honto min kaŝis mi  
en keston sen kri’.”**

### **Soifa poŝo**

*el la rakontoj pri Afanti*

**En festen’  
Afanti klare  
vidis gaston enpoŝen  
meti panojn avare  
kaj sendeklare.**

**Afanti  
tekruĉon ŝtele  
prenis kaj verŝis teon  
en lian poŝon vere,  
tiel kruele.**

**La gasto  
ĉuis ŝokite:  
“Kial vi faris tion?”  
Afanti senhezite  
diris ja sprite:**

**“Via poŝ’  
soifas certe.  
Ĝi jame manĝis panojn,  
sen akv’ ĝi senaverte  
formortos merde.”**

### **Teo kaj amo**

*omaĝe al filmfestivalo de “Teo kaj amo”*

**Ĉina te’  
kun granda magi’  
aromas tra la mondo  
same kiel poezi’  
en versa ebri’.**

**Tefoli’  
flosas libere  
en boligita akvo  
jen ŝvelante leĝere  
laŭplaĉe vere.**

**Bonodor’  
elas dum moment’  
en infuzado varma  
kun gusto de orient’—  
plenplena de tent’.**

**Ĉu verda**



**ĉu bruna teoj  
prezentas ligiĝon de  
diversgentaj ideoj—  
ne pluas veoj.**

**Nune ni  
per esperanto  
esprimas aman senton  
de te-kultura planto  
por paca kanto.**

**L' akordo  
monda de l' homo  
regos tra kontinentoj  
jen en alvoka sono—  
“vojo kaj zono”.**

## **En razejo**

*el la rakontoj pri Afanti*

**Afanti  
pro varma veter'  
volis razigi l' kapon  
kaj iris al la razej'  
por tonda afer'.**

**Verŝajne  
ne estis sperta**

**la razist' en metio,  
ĉar lia man' mallerta  
en ag' malcerta**

**vundetojn  
kaŭzis sur la kap'  
de Afanti kelkloke  
per la razila skrap'  
pro malzorga frap'.**

**La razist'  
metis zorgeme  
vaton sur la vundetojn.  
Sed Afanti senĝeme,  
senkolertreme**

**stariĝis  
kaj rigardis sin  
en la spegul' dirante:  
"Ho! Vi ja fascinas min  
per via ŝat-klin'.**

**Vi plantis  
blankan kotonon,  
ja lerte kiel majstro,  
sur mian kapduonon  
kvazaŭ gazonon.**

**Nu, bone,  
aranĝos mi mem  
la alian duonon  
de la kapo kun zorgem'  
per lina dissem'."**

## **Mi atendas vin en pluvo**

**En pluvo  
mi staras sole.  
Pluvgutoj malsekigas  
mian koron frivole  
forte malmole.**

**La pluvo  
inundas brue  
kiel mia soleco,  
mi vin atendas plue  
firme senskue.**

**Mi larmas  
pluve korŝire.  
Vian venon atendas  
mi longtempe sopire  
jen senforire.**

**Atendas  
mi ja kun esper'  
vian dolĉan rideton.**

**Mi atendas kun sincer'  
brule de sufer'.**

**En pluvo  
mi en kvieto  
aspiras je via am',  
via varma flueto  
laŭ mia peto.**

**Mi bone  
jam scias kore,  
ke amos reciproke  
ni ĉie, ĉiuhore,  
vere fervore.**

**Yanke**

### **Soleco**

**Kelkfoje  
soleco estas  
libro en miaj manoj  
kiu min ja molestas  
kaj min infestas.**

**Kelkfoje  
mopso ŝajnas ĝi  
kun la svinganta vosto  
amuze ludas kun mi**

jen per emoci’.

**Kelkfoje**  
ĝia kara am’  
karesas mian koron  
kiel konsola balzam’  
efemera jam.

**Kelkfoje**  
kiel aŭtun-briz’  
freŝigas mian menson  
en konfuz’ per vola kis’  
sen vorta aviz’.

**Ĉiame**  
en ĝia brakum’  
mi nestas obeeme  
en la komforta kostum’  
sub dormema zum’.

## **Rideto**

**Rideto**  
ludas petole  
ĉe ŝiaj lipoj ruĝaj  
kaj vankavoj frivole  
belas bonvole.

**Rideto**

**sin kaŝas ame  
malantaŭ perlaĵ dentoj.  
Ŝi ridetas tre ĉarme  
fajne balzame.**

**Rideto  
ŝia leĝere  
ventas tra mian koron,  
levas sopiron vere  
mian espere.**

**Rideto  
sub la hararo  
tiklas mian sentemon  
de ama malavaro  
trans ajna baro.**

## **La plej bela sezono**

**Folioj  
iom post iome  
flaviĝas ĉe aŭtunfin’  
kaj ekfalas malzome  
kaj pejzaĝ-done.**

**Orflavaj  
flokoj en aer’  
flirtadas papilie  
vent-rajde en liber’**

**sible kun leĝer’.**

**La tero  
kovriĝas plene  
per folioj en orflav’  
ne mortintaj ĉagrene  
sed vivaj bene.**

**Sur river’  
flosas laŭflue  
oraj veletoj belaj,  
ja cedemaj senbrue  
kaj vetur-ĝue.**

**Folioj  
de flava kolor’  
pavimas la teron per  
bela natura trezor’  
brila kiel or’.**

**ha, kiel  
bela la mondo!  
La panoram’ aŭtuna  
de rivero ĝis monto  
belas en blondo.**

## **Pontoj en mia hejmloko**

**Mi staras**

**sur alta roko  
fronte al la direkto  
de la kara hejmloko  
trans nuba bloko.**

**La pontoj  
tie en menso  
mia ĉiame vekas  
sopiron en intenso  
de senta denso.**

**Mi ŝatas  
tiujn sincere  
pontojn oldajn kaj muskajn  
kun kelkaj arkoj vere  
al mi fiere.**

**En knabec'  
mi ludis tie  
amuze kaj senĝene  
kaj en akvon defie  
saltis ĝojkrie.**

**Frekventis  
mi ir-reire  
lernejon ĉiutage  
trans la pontojn facile  
per paŝoj brile.**



**Vizie  
ili solide  
transportas super fluoj  
torentantaj senbride  
al sud' rapide.**

**La pontoj  
centojn da jaroj  
travivis mil damaĝojn,  
post novigaj riparoj  
kun firmaj staroj.**

**Ja ili  
kun miaj revoj  
kaj hejmveoj amaraj  
restas dum tempaj levoj  
kaj temp-mallevoj.**

**Pri ili  
de malproksime  
mia sopiro ĉiam  
sin etendas senlime,  
daŭras senfine.**

**Mi sola**

**Kiam mi  
restas tutsola**

en ĉambro etaĝdoma,  
mi min sentas izola  
kaj senkonsola.

Kiam mi  
promenas pade,  
mi iras kun la ombro  
tien kaj reen vade  
senkamarade.

Kiam mi  
restas vigila,  
mi parolas al mi mem  
per tono maltrankvila  
kaj senkonsila.

Kiam mi  
manĝas diete,  
mi nur rongas nutraĵojn  
jen por vivi vegete  
ho ve, kviete.

Kiam mi  
drinkas ebrie,  
mi deliras kaj kantas  
vere melankolie  
kaj malĝojkrie.

**Kiam mi  
ripozas pace,  
min tuj ĉirkaŭas tristo,  
min rigardas grimace,  
premas minace.**

**Mi jame  
oldas senile  
sen ajna akompano,  
petas helpon humile  
vivas senbrile.**

### **Neĝero flirtas**

**Neĝeroj  
fliras kun leĝer'  
jen supren jen malsupren  
dancante en frost-aer'  
super la river'.**

**Neĝeroj  
falas fine jen  
en riveron fluantan  
kaj tuj akviĝas en sven'  
sen ajna kriĝem'.**

**Tavolo  
da neĝ' sur tero  
dikiĝas ja pli kaj pli,**

**glimas kun blanka belo  
sub suna helo.**

**Ĝi vestas  
per blank-mantelo  
arbojn, domojn kaj montojn,  
glaciiĝas en gelo  
jen sur rivero.**

**Ĝi flirtas  
en densa nebul'  
kiel bird' en aero.  
Blovas vento en ulul',  
ĝi dancas en rul'.**

**Malsupren  
ĝi flugas bele  
ĝis verda arbopinto  
kaj kisas ĝin leĝere  
kaj nestas sukere.**

**Atendas  
ĝi jen kun sopir'  
blankajn amikojn fali  
por kuniĝi per dezir'  
en sama stabil'.**

**Neĝeroj,**

ha, via vojaĝ'  
el la alto ja estas  
la spirito de kuraĝ'  
en fluganta naĝ'.

**Zhuang Qixiong**

### **Internacia Infana Tago**

**Bona tag'  
gaja, naiva.  
Mi babilas kun rido  
pro hejmsopiro viva.  
Amo masiva.**

*2018-6-1*

**En la grupo de ĉina mondliteraturo okazis  
stafedo pri ĉinesko Sopir-al-sudo:**

**Vejdo:**

**Somere  
sur blua ĉiel'  
la suno ardas brile  
kun lumo de forta hel'  
kaj per varma pel'.**

**Gajo:**

**somero,  
varma sezono.**

**la suno vershas flamon,  
despli sur tropikzono,  
en brula drono!**

**Gajo:**

**nun al ni  
venas somero.  
en tiu kreska sezono,  
regas floroj, abeloj,  
bel' kaj prospero!**

**Zhuang Qixiong:**

**Somero  
fridas en silent'.  
Ne dormi pro nokta pluv',  
nur bonodori en vent'.  
Sola por vin-sent'.**

**Vejdo:**

**Eĉ varmon  
alportas vento  
al tero kaj rivero  
en enua silento  
de laca sento.**

**Gajo:**

**sekundo  
de la komenco**

**de ĉina Grenspikiĝo  
portis varmon al senso,  
ĝojon al menso!**

### **Gajo**

**anoncas  
tio rikolton  
richan en vastaj kampoj!  
farmuloj donas forton  
spite sunmordon!**

### **Minosun:**

**Cikadoj  
ĉirpadas fole  
en bulvardo; knabinoj  
en korseto strangole  
pasas jam mole.**

### **Minosun:**

**Sin movas  
nuboj sur ĉiel',  
super lago salikoj  
flirtas, kiam kun chapel'  
ŝi flosas en vel'.**

### **Vejdo:**

**Abeloj  
flugas en flor-mar'**

**tien kaj tien haste  
veture per flugilpar'  
por fresha nektar'.**

**Kun zumad'  
ili fervore  
frekventas de flor' al flor'.  
Donas sunlum' favore  
bonon brilglore.**

**Vejdo:**

**Insektoj  
en la varma ondo  
ne cedas en ĉirpado,  
eĥas per brua respond,  
forte kun volont'.**

**Verŝajne  
varmo de somer'  
ja ne povas subigi  
estaĵetojn sur ter'  
kun viva esper'.**

**Minosun**

**La lasta  
mortis lampiro,  
la steloj brile larmas  
pri l' fratoj en sopiro, –**



**vanas suspiro.**

**Vejdo:**

**Kial do  
mortis lampiro?  
En somer-nokta mallum'  
flagras ĝia vagbrilo—  
ĉies admiro!**

**En varma  
sufoka aer'  
ŝvebdancas papilioj  
super floroj en liber',  
Per fluga leĝer'.**

**Minosun**

**Dum libron  
mi legas, gute  
pluvas en nokt' somera.  
La lego absolute  
daŭros pli glute!**

**Sur roko  
sidas heliko  
por ripozo en ombro  
kiun donas saliko –  
kia amiko!**